

# RESUMOJ EN ESPERANTO

## LINGVOPOLITIKO

Maria KURPASKA: **Efikoj de lingva politiko en Ĉinio**

La loĝantaro de Ĉinio konsistas el 56 oficiale rekonataj etnaj grupoj kiuj uzas 135 ĝis 300 lingvojn (depende de la aplikataj kriterioj). Ĉ. 90% de la populacio deklaras apartenon al la nacieco Han. La lingvo uzata de tiu ĉi plimulto ne estas unueca; variaĵoj de la ĉina estas tiom diversaj ke la plimulto inter si ne interkompreniĝas, kaj kelkaj lingvistoj nomas ilin apartaj lingvoj. La restantaj 10% parolas lingvojn, kiuj divideblas al 5 lingvofamilioj.

Ĉu eblas enkonduki unu komunan lingvon en la landon de la plej granda populacio en la mondo? Ĉinoj gvidas tian lingvopolitikon ekde la kvindekaj jaroj. La celo de la disvastigo de landa normo – de la mandarena lingvo (putonghua) en la tuta lando – estas ke ĉiuj loĝantoj povu libere interkomuniki. Tiu idealisma agado estas jam tre disvastiĝinta kaj kaŭzis grandegajn ŝanĝojn en la lingva pejzaĝo de Ĉinio.

Ne ĉiuj lingvaj rajtoj de la minoritatoj inkluditaj en la konstitucio estas respektataj. Same ne-mandarenaj variaĵoj de la ĉina subiĝas al unuecigo, kaj en la lokaj lingvoj rimarkeblaj ŝanĝoj okazas. En ĉi tiu artikolo estas prezentataj diversaj aspektoj de la ĉina lingvopolitiko; pozitivaj kaj negativaj rezultoj por la uzataj lingvoj.

Tamar SUKHISHVILI: **La kartvela lingvo: minacoj kaj defioj**

Kiuj estas la minacoj kaj defioj kiujn lingvoj alfrontas en la tempo de tutteriĝo, kiam progreso kaj prospero uzas la dominantan lingvon? Kaj kiel ili povas eviti la influojn de la plej vaste parolataj lingvoj? Kiel povas lingvoj partopreni en interkultura dialogo kaj konservi sian identecon samtempe? La artikolo provas trovi respondojn al tiuj ĉi demandoj fokusiĝante al la ekzemplo de la kartvela lingvo kiun parolas ĉ. 4 milionoj da homoj. La ekzemplo de la kartvela estas signifa pro pluraj kialoj: a) ĝi estas oficiala lingvo de Kartvelio, lando kun granda lingva diverseco kaj tiel ĝia lingvopolitiko celas protekti aliajn regionajn kaj etnajn lingvojn; b) aliflanke, la kartvela povas esti konsiderata kiel lingvo kies viveblecoj estas minacataj. La artikolo prezentas historian fonon, priskribas la minacojn dum kaj post la Sovieta reĝimo. Ĝi koncentriĝas al la aktualaj situacio, lingvopolitiko kaj defioj.

**Walter ŹELAZNY: Lingvopolitiko en Nova Brunsviko**

Celo de ĉi tiu artikolo estas montri la avancon de la franca lingvo en la provinco Nov-Brunsviko en Kanado, de kies teritorioj dum la jaroj 1850-60 la Britoj deportis la plimulton de Akadianoj por konstrui anglalingvan provincon, tiam kun la protestanta plimulto da loĝantoj. Nun la kanadaj provincoj rajtas al la propra lingva politiko kondiĉe ke ili respektas la formalan principon de dulingvismo de la kanada federacio. Kebekio enkondukis propran lingvan politikon, kontraŭan al la kanadaj konstituciaj leĝoj, proklamante en la jaro 1976 la francan la sola oficiala kaj nacia lingvo. La leĝo estas konata sub la nomo *Loi 101* 'leĝo 101'. Ĉio ĉi okazis dum la t.n. *trankvila revolucio*, kiu karakteriziĝis inter alie per la abrupta sekulareco de la provinco, kiu grandparte ŝuldis la pozicion de la franca dank'al la romkatolika eklezio. Kontraŭe Nov-Brunsviko proklamis dulingvecon dank'al katolikaj politikistoj. Tiel aspektis la lingva politiko de Kebekio kaj Nov-Brunsviko en la ombro de religio.

En la ĉiutaga vivo de civitanoj, kie religio nun okupas privatan sferon, manifestiĝis bezono de nova identeco de Kebekio kaj Nov-Brunsviko, kaj en la sama tempo de la tuta Kanado. Religio malaperis kaj sur la politikan kaj kulturalan scenojn eniris novaj konceptoj de identeco, ĝuste surbaze de lingvoj kaj la multkultureco. Ili estas la plej gravaj diferencaj ecoj, kiuj difinas Kanadon rilate al la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko. Ĉio ĉi klarigas al ni la komplikan lingvan politikon je la kanada federacia nivelo, sed antaŭ ĉio sukcesaj kaj malsukcesaj provoj enkonduki la principon de la oficiala dulingveco en la vivon de kanadaj provincoj.

**Detlev BLANKE: Komunikado en Eŭropo – kelkaj lingvo-politikaj aspektoj**

Eŭropa Konsilantaro kaj Eŭropa Unio (EU) komune deklaris la jaron 2001 „Eŭropa jaro de la lingvoj“. Ekde tiu jaro la 26-a de septembro ĉiujare en Eŭropo estas festata kiel “Eŭropa Tago de lingvoj”. Tiuj ĉi iniciatoj estas indikoj pri tio, ke oni pli kaj pli forte ekkonsciadas pri la signifo de eŭropa lingvopolitiko, pri la kompleksaj problemoj kaj aspektoj ligitaj al ĝi.

Por nia celo ni komprenu sub *eŭropa lingvopolitiko* la konscie realigatan publikan influadon al la statuso, utiligo kaj disvastigo de la lingvoj, parolataj en EU. En tiu ĉi studo eblas nur tuŝi kelkajn problemojn de ampleksa temaro: jurajn solvojn, lingvojn kaj lingvajn konojn de eŭropanoj, la praktikan lingvo-peradon, kostojn de multlingveco kaj diversajn lingvopolitikajn modelojn.

**Maciej JASKOT: Skizo de la politiko pri plurlingvismo en la Hispana Reĝlando**

Ĉi tiu artikolo koncernas la situacion de multlingvismo en Hispanio, kun speciala emfazo pri ĝia jura regularo. Nuntempe ĉirkaŭ duono de la hispana loĝantaro loĝas en du- aŭ plurlingvaj areoj. La situacio de la multlingva lando speguliĝas en leĝaj

dokumentoj kaj en la hispana konstitucio mem. La realaĵo de multlingva socio estas reguligita de la jura sistemo kaj reflektiĝas en ĉiuj sferoj de socia vivo. La procezo de reakiro de regiona lingva identeco en la Iberia Duoninsulo estas ofte asociata kun la postuloj de regiona sendependeco (ekzemple en Katalunio aŭ Eŭskio). Tiel, la koncepto de multlingvismo fariĝas ostaĝo de si mem kaj ŝajnas subfosi la principojn de pluralismo. Ĉu la hispana modelo efikas kaj kiaj estas ĝiaj principoj?

**Félix Manuel JIMÉNEZ LOBO: Kial la hispana ne rolas kiel interlingvo en la Filipinaj Insuloj?**

Tiu ĉi artikolo esploras la kaŭzojn de la malapero de la hispana kiel interlingvo en Filipinoj post la ŝanĝiĝo de la kolonia rego je la fino de la XIXa jarcento. (La termino interlingvo rilatas al tio kiel priskribi la uzadon de la hispana kiel oficiala kaj kiel pontolingvo inter parolantoj de malsamaj gepatraj lingvoj). Unue la aŭtoro klarigas la geografian, etnolingvan kaj historian kuntekston de la insuloj, resumas la evoluon de la lingvo ekde la komenco de la koloniado ĝis hodiaŭ, kun speciala atento al la apero de iu kreolo, la ĉabakana, kaj prezentas la kaŭzojn tradicie argumentitajn de la malapero de la lingvo. Poste li komparas la evoluon de la hispana en Filipinoj kun aliaj hispanaj ekskolonioj kaj fine konkludas montrante, ke la hispana malaperis pro kombino de unikaj historiaj cirkonstancoj, kiuj ne okazis en aliaj teritorioj de la iama Hispana Imperio.

**Basak ARAY: Sylvia Pankhurst kaj la internacia helplingvo**

Sylvia Pankhurst estis pionira figuro de socialisma feminismo kiu pledis por la ĝenerala voĉdonrajto kaj kontraŭ milito. Malpli estas konata ŝia involviĝo en la movado por internacia helplingvo. En 1927 Pankhurst publikigis libreton *Delphos. The Future of International Language (Delphos. La futuro de internacia lingvo)* kie ŝi priskribis la kreskantan bezonon por monda helplingvo kaj sian subtenon por Interlingua (Latino sine flexione). Biografie bazita studo pri *Delphos* montras la modernisman, kosmopolitan kaj demokratian alvokiĝon de la internacia helplingva movado en la komenco de la 20-a jarcento. La ideoj de Pankhurst pri la motivado kaj principoj de estonta interlingvo estis similaj kiel tiuj de la komunumo de internacia helplingvo. Ni prezentas ŝian subtenon por Interlingua kiel ekzemplon de scienca humanismo kiu regis ĉe la komenco de interlingvistiko kaj rilaton de ŝia prilingva aktivado al ŝiaj socialisma kaj pacifisma sinteno.

**Michael FARRIS: Esperanto kaj la merkata ŝtato**

La nacia ŝtato estas formo de registaro, kiu kunigas ĉefan etnan, lingvan aŭ kulturalan grupon en komuna teritorio. Ĝi devenas de la 17a kaj 18a jarcentoj kaj estas la

reganta ŝtatformo en la 19a kaj 20a jarcentoj. Laŭ tiu modelo, la legitimeco de la estraro devenas de la provizo de servoj (kiel edukado, infrastrukturo kaj sociaj programoj) al la civitanaro. Esperanto estas produkto de la naci-ŝtata periodo kaj multe da simboloj kaj strukturo de la Esperanto-movado devenas de la naci-ŝtata idearo. Nuntempe tamen, laŭ multaj sociaj kaj politikaj analizistoj ĉi tiu formo de ŝtatorganizo komencis malaperi kaj nova ŝtatformo, ofte nomata la *merkata ŝtato* komencas anstataŭi ĝin. En la merkata ŝtato la rilatoj inter civitanoj kaj registaro (kaj inter registaroj) spertas profundajn kaj vastajn ŝanĝojn. Ĉi tiu artikolo esploras la ŝancojn kaj obstaklojn kiujn la Esperanto-movado alfrontas en la merkata ŝtato.

### Vicente MANZANO-ARRONDO: **Lingva subpremanta diskurso kaj nuntempa universitato**

La disvastigo de la angla lingvo en kaj ekster universitatoj povas esti rimarkata kiel konsekvenco subtenata de potenĉava diskurso. Ĉi tie, ĝi estas nomata DANPI: Diskurso pri la Angla lingvo kiel Neceso kaj Profitindaĵo Individuaj. Tiu diskurso konsistas el kvin eroj: (1) Lernu la anglan aŭ malaperu!; (2) Vi estas la nura homo, kiu ankoraŭ ne regas tiun lingvon; (3) Uzu viajn personajn rimedojn por solvi tion!; (4) Ne suferu: la angla malfermos por vi nekredeblajn pordojn; kaj (5) Kiu etika problemo? La afero estas neŭtrala!

DANPI aktivigas gravajn nuancojn en universitatoj, kies membroj montras pli individuan pensmanieron ol neuniversitatoj. Krom la graveco de DANPI per si mem, tiu diskurso havas sian ĉefan rolon ene de pli kompleksa procezo: la lingva subpremado. Pro tio, tiu ĉi artikolo skize priskribas tiun lastan koncepton kaj kiel DANPI rolas en ĝi. Por ne lasi la aferon nur en la teoria dimensio, ĉi tie mi prezentas du proponojn. La unua estas aro da agadoj por iel solvi la aferon universitate; tio estas, gravas (1) elstarigi ĉiujn gepatrajn skribajn lingvojn kiel taŭgajn por okupiĝi pri la tipaj universitataj aferoj; (2) substreki la gravecon esplori kaj instrui pri konkretaj problemoj en lokaj medioj, kie sendube la loka lingvo estas la plej taŭga; (3) faciligi la universitatan uzadon de Esperanto, kiam la internacia medio gravas; kaj (4) trovi efektivajn solvojn por tiaj situacioj, kiam universitatoj sentas bezonon komuniki internacie sen uzi internacian lingvon. La dua propono estas aro da hipotezoj, kiuj estas esplorindaj por plibonigi scion kaj agadon pri la celo kunlabori por elstarigi pli liberan kaj socie utilan universitaton, ĉefe sed ne nur ĉirkaŭ la lingva afero.

### Humphrey TONKIN: **Esperanto: Lingvopolitika taksado**

Malkiel la plimulto de projektantoj de planitaj internaciaj lingvoj, la kreinto de Esperanto, L.L. Zamenhof, egale interesiĝis pri statusa kiel pri korpusa planado. La projekto de Zamenhof estis sufiĉe kompleta por esti uzata kiel komunikilo, sed sufiĉe nekompleta por permesi al la komunumo de Esperanto-parolantoj, ke ĝi faru grandan

parton de la laboro por transformi lian projekton en plene funkciantan lingvon. Zamenhof mem rigardis la lingvon kiel perilon al pli granda afero, kaj tute frue, konfidis la evoluon de la lingvo al ĝiaj parolantoj dum li mem sekvis pli altajn ideologiajn celojn. Lastatempaj fakuloj turnis sian atenton al la ideologia flanko de la Esperanto-komunumo ĝenerale, inkluzive la fortan sindediĉon de Esperanto-parolantoj al lingva justeco kaj pli forta konscio de la valoro de multlingvismo kaj lingva diverseco.

## DIVERSAJ TEMOJ

### Ida STRIA: **Lingvaj sintenoj de Esperanto-parolantoj**

Esperanto estas planita internacia helplingvo, konstruita de L.L. Zamenhof kaj eldonita en 1887. Kvankam kreita por faciligi internacian komunikadon, ĝi iĝis ilo por mem-identigo. Ĉi tiu artikolo celas priskribi lingvajn sintenojn formitajn en la esperanta parolkomunumo kaj pruvi, ke tiuj ĉi sintenoj formas la komunumon.

### Paweł FISCHER-KOTOWSKI: **Esploro de legokutimoj de la esperanta komunumo**

La sociologiaj esploroj faritaj ĝis nun en la Esperanta komunumo nur en malgranda grado koncentriĝis al la librolegado. La aŭtoro de la artikolo surbaze de la propraj esploroj pri librolegado, plenumitaj dum la 100-a Universala Kongreso de Esperanto (2015), faras komparojn pri la nivelo de legado inter la uzantoj de Esperanto kun la rezultoj de la esploroj pri legado kiujn faras la Nacia Biblioteko de Pollando. Malgraŭ la malpli facilaj kondiĉoj de la disvolviĝo de la Esperanto-kulturo – manko de la sistemo de formala edukado, manko de organizitaj, bone financataj kulturaj institucioj – la Esperanta komunumo estas averaĝe pli bone edukita kaj legas pli multe da libroj ol la poloj ĝenerale.

### Szymon MACHOWSKI: **Laŭtemaj kapvortoj en MESH kaj legantoj de medicina literaturo**

Tiu ĉi artikolo celas esplori la rilaton inter medicinaj laŭtemaj kapvortoj en la pola kaj angla lingvoj, kaj la rezultojn de bibliotekaj serĉoj per la serĉmaŝino de la Medicina Biblioteko de la Jagelona Universitato en Krakovo. La polaj kaj anglaj kapvortoj estas analizataj laŭ siaj semantikaj plursignifecoj kaj la enteksta frekvenco de respondaj medicinaj terminoj estas esplorataj. Ni atentigas ankaŭ diversajn tradukeblecojn de novklasikaj polaj terminoj entenataj en la kompleta datumbazo de medicinaj kapvortoj kun iliaj anglaj ekvivalentoj. La analizon enkondukas konciza skizo pri la historiaj kaj

---

teoriaj bazoj de medicinaj kapvortoj en bibliotekaj kaj terminologiaj esploroj rilate al fakaj lingvaĵoj.

**Włodzimierz LAPIS: “Elstarigo”, “diferencigo” kaj “distingo” kiel specoj de distingebleco en la “Miljara Biblio”**

La teksto traktas tiujn fragmentojn el la Miljara Biblio en kiuj aperas unu el la tri specoj de distingebleco: elstarigo, diferencigo kaj distingado. Estas esplorata, ĉu ilia uzo konvenas al ilia difino (far la aŭtoro), same tio, por kiuj aferoj ili estas uzataj. Per tio ni esploras kiel kompreni distingeblecon en la Biblio – same flanke de la originaj aŭtoroj kiel (en la kazo de la Miljara Biblio) kaj en pola traduko.